

31a ORDINARA DIMANĈO - 30-a de oktobro 2016

LA FILO DE LA HOMO VENIS POR SERĈI KAJ SAVI LA PERDITAĴOJN

El la evangelio laŭ Luko 19, 1-10

Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

En tiu tempo Jesuo eniris en Jeriĥon, por pasi tra tiu urbo. Tie vivis viro, nomata Zakĥeo. Li estis ĉefimpostisto, tre riĉa. Li klopodis vidi Jesuon, sed li ne povis pro la homamaso, ĉar li estis malalta je staturu. Tiam li kuris iom antaŭen kaj grimpis sur arbon, en loko, kie Jesuo devos pasi. Tiel li esperis, ke li sukcesos vidi Lin. Alveninte tien, Jesuo levis la okulojn kaj diris al Zakĥeo: „Rapidu malsupreniri, ĉar hodiaŭ Mi devas loĝi en via domo.“ Zakĥeo tuj malsupreniris de la arbo, kaj kun granda ĝojo akceptis Lin en sia hejmo. La ĉeestantoj, vidante tion, murmuradis kontraŭ Jesuo. Ili diris: „Li iris loĝi ĉe uzuristo.“ Sed Zakĥeo, starante antaŭ la Sinjoro, diris al Li: „Sinjoro, duonon de miaj posedaĵoj mi donacas al la malriĉuloj; kaj se mi ŝtelis al iu, mi redonos al li kvaroblon.“ Tiam Jesuo diris al Zakĥeo: „Hodiaŭ venis la savo en ĉi tiun domon. Ankaŭ vi estas filo de Abraham. Nu, la Filo de la homo venis ĝuste por serĉi kaj savi tiujn, kiuj estis perditaj.“

La evangelio de Luko malfermiĝis per la deklaro “*Ĉe Dio nenio estas neebla*” (Lk 1,37). Ne ekzistas situacioj senesperaj, nek personoj, kiajn ne povas atingi la amo de Dio. Ĉu vere? Ŝajne du kategorioj aspektas tiaj. La unua estas tiu de la impostistoj: ili enkasigis la impostojn, kaj oni ilin taksis malobeantoj de ĉiuj diaj ordonoj, nepuraj uloj sen ia savebleco.

Tiu estis la baro de la publika opinio. Alia baro venis rekte de Jesuo, kiu en sia komunumo ne akceptis riĉulojn. Li tion estis dirinta klare: “*Estas*

pli facile por kamelo iri tra trueton de kudrilo ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio” Lk 18, 25-26).

En la komunumo de Jesuo estas sinjoroj, ne riĉuloj. Kiu estas la diferenco? Riĉulo posedas ĉar li retenas por si. Sinjoro donas kaj kundividas kun aliaj.

Nu, en la hodiaŭa ĉapitro ni renkontas situacion senesperan, ne solveblan. Ni legu.

En tiu tempo Jesuo eniris en Jeriĥon, por pasi tra tiu urbo. Tie vivis viro, nomata Zakĥeo (tio ŝajnas ironio: tiu nomo en la hebrea lingvo signifas “pura”:, kaj li estas plej nepura, riĉa). Li estis ĉefimpostisto, tre riĉa. Ĝuste la du ecoj, tenantaj lin malproksima de la savo. Ne nur impostisto, sed la estro de la impostistoj. Kaj riĉa, aldone. Laŭ la religia socio li estas for de Dio, kaj laŭ Jesuo li ne povas aparteni al lia komunumo. Ni ja asertis, ke la situacio estas senespera.

Li klopodis vidi Jesuon, sed li ne povis pro la homamaso, ĉar li estis malalta je staturu. Luko ne volas mezuri: “malalta” signifas, ke li ne estas alta kiom Jesuo. kial? ĉar pro sia metio li povas trompi kaj ŝteli, do agi maljuste, kaj ĉefe ĉar li estas riĉa. La riĉuloj ne estas kompareblaj kun Jesuo.

Tiam li kuris iom antaŭen... (Jen la unua ŝanĝo en lia konduto: li estis estro, liaj subuloj lin respektis kaj timis: (en tiu socio, kurado estas signo de humileco: superulo kuras neniam) ... kaj grimpis sur arbon (en la flaŭro de tiu regiono ekzistas altaj arboj, ekzemple sikomoroj; nun ĉe Jeriĥo estas plantita unu ekzemplero, memore al tiu ĉi epizodo)..., en loko, kie Jesuo devos pasi. Tiel li esperis, ke li sukcesos vidi Lin (Zakĥeo opinias, ke por vidi Jesuon li bezonas supreniri, kaj tiu estis la tiama pensmaniero, al Dio oni proksimiĝas irante supren).

Sed ni vidu la planon de Jesuo: *Alveninte tien, Jesuo levis la okulojn kaj diris al Zakĥeo: „Rapidu malsupreniri, ĉar hodiaŭ Mi devas (la evangelia senco de tiu verbo estas, ke tio estas dia decido: entute ĝi egalvaloras al “volas”) loĝi en via domo”. Zakĥeo tuj (ankoraŭfoje hasto) malsupreniris de la arbo, kaj kun granda ĝojo ... (de kie venas tiu ĝojo? De la akcepto de la amo de Jesuo, kaj de kio, kion li estas faronta akceptante tiun amon... akceptis Lin en sia hejmo.*

Se Zakêo estis ĝoja, tiaj ne estis la aliaj ĉeestantoj. Ĉiuj (vere ĉiuj) plendis: *ili diris „Li iris loĝi ĉe uzuristo”*. Laŭ ili ĉiuj, li estas pekanto, kaj la pekantojn oni admonas, oni riproĉas, precipe oni *evitas*. Kiel persono pura povas eniri ĉe nepurulon restante pura? la infekto lin atakus. Jesuo renversas tiun opinion: pekinto ne devas puriĝi por inde kontakti lin: la akcepto de Jesuo igas lin inda.

Sed Zakêo, starante antaŭ la Sinjoro, diris al Li: „Sinjoro, duonon de miaj posedaĵoj mi donacas al la malriĉuloj (do li estis riĉa, kaj nun li estas malpli riĉa; kaj se mi ŝtelis al iu (certe li ŝtelis), mi redonos al li kvaroblon (tio estis pli multe ol la leĝo postulis (Lev 5, 36). Kio okazas? Li ne estas riĉa, sed li estas feliĉa.

Tiam Jesuo diris al Zakêo: „Hodiaŭ venis la savo en ĉi tiun domon. La evangelio de Luko komenciĝas nomante Dion “savanto “ “mia spirito ĝojis en Dio, mia savanto” (Lk 1, 47). En ĉi tiu ĉapitro unuafoje (kaj lastafoje) Luko uzas eksplicite la vorton “savo”. ‘Ankaŭ vi estas filo de Abraham’ La aliaj opiniis, ke li, pro sia konduto, estas forigito, nepurulo, malbenito. Ne! Jesuo tion proklamas. Nu, la Filo de la homo venis ĝuste por serĉi kaj savi tiujn, kiuj estis perditaj”.

La filo de la homo ne atendas, ke la pekintoj venos al li pentofarante. Iras li al renkonto kun tiuj pekuloj por komuniki vivon. Kial Jesuo diras “savi tiujn, kiuj estis perditaj”? Ĉar riĉo detruas la homojn. Vivon oni ricevas donante kaj ne amasigante. Jen la bona novaĵo portata de Jesuo. Tial por li ne ekzistas kazoj nesaveblaj, kazoj senesperaj.